# *En afabla etoso renkonti?is Díaz-Canel kaj la prezidento de Belizo.*



Havano, 16 jan (RHK) La prezidento de la ?tata kaj ministra konsilantaro de Kubo, Miguel Díaz-Canel, akceptis en tiu ?iurbo la ?efministron de Belizo, la eminenta Dean Oliver Barrow, kiu plenumas oficialan laborviziton en la insulo.

En amika etoso amba? ?tatestroj dialogis pri la bona stato de la reciprokaj rilatoj kaj koincidis pri la volo da?rigi fortigante siajn ligojn. Ili same dialogis pri temoj regionaj kaj internaciaj  de reciproka intereso.

Flanke de Kubo partoprenis la ministro pri eksteraj rilatoj Bruno Rodríguez; la ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca; la ?enerala direktoro de latinameriko kaj karibio de la ministerio pri eksteraj rilatoj, Eugenio Martínez; samkiel la ambasadorino en Belizo, Lissette Pérez.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/181138-en-afabla-etoso-renkontigis-diaz-canel-kaj-la-prezidento-de-belizo

# Radio Habana Cuba